	Jarkolekto : 2003	Numero : 4	Paĝo : 1
<h1>La Voĉo de Amikejo</h1> <p>Informilo pri <i>Senlime</i> kaj Esperanto en Eŭregiono Mozo-Rejno</p>			
<p style="text-align: center;"><i>Senlime</i> Esperanto-Asocio en Eŭregiono Mozo-Rejno</p>	Sendita al :		
<p>En cas de non-distribution, renvoyer à H. Lentzen Feldweg 20 BE-4701 KETTENIS Tel. xx-32-(0)87-55.43.26 E-mail : lentzenh@gmx.net</p>			

Editeur responsable
Responsa eldonanto +
Informoj en la franca lingvo:
Tel. +32-(0)87/33.02.92
GSM +32-486-947.957
Mail: jmjsenlime@planetinternet.be
J.-M. Jacques, 5 rue Joseph Wauters,
BE-4800 VERVIERS

Informatie in het Nederlands
Informoj en la nederlanda:
Tel. xx-31-43-3062015
Mail: ni bedaŭrinde devas peti vin ke vi provizore bonvolu uzi alian skatolon...
(Senlime serĉas novan kunlaboranton anstataŭe de T. Sinno)

Informationen auf deutsch
Informoj en la germana:
Tel. xx-49-2406-7809
Mail: hogen@t-online.de
K. Hogen, Schütz-v-Rode-Str. 43
DE-52134 HERZOGENRATH

Tiu-ĉi informilo aperas kvarfoje en jaro.

Jara abono / aliĝo : 10 EUR

Belgio : konto 000-0245571-64
IBAN BE.. 0000 245 7164
Esperanto-Grupo, 22 rue Donckier,
BE-4800 VERVIERS

Nederlando :
ni bedaŭrinde devas peti vin ke vi provizore bonvolu uzi alian konton.

Germanio : konto 6623201,
Sparkasse Aachen (BLZ 390 50000)
Im Pesch 20
DE-52134 HERZOGENRATH

Kotizoj do principe pagendas dum la novjara periodo (decembro aŭ januaro).
La kotizintaj membroj principe ĝuas rabaton okaze de aliĝo al Trilanda Renkontiĝo organizita de *Senlime*.

NE OKAZOS la Trilanda Renkontiĝo

en **Lieĝo** okaze de la centa naskiĝ-datreveno de la mondfama verkisto *Simenon*...
pro tio ni pardonpetas (kaj mi parenteze rememorigas ke mi responsas nur pri la revuo... ne pri ĉiuj organizaĵoj...) sed vi tamen rajtos ĝui iomete la promesitan etoson :

- Okaze de la komenciĝo de nova lerneja jaro, legu (p.2) esperantan tekston el la romano de Georgo Simenono : « *Maigret en la lernejo* » (originala franclingva teksto p.3).
- Konatigxu kun la ludo “**Cluedo**” en speciala “giganta” formo kiun ni intencis organizi en la stratoj de Lieĝo, sur la spuroj de Simenon! (p. 4).
- Spertu la kuirmanieron la edzino de Maigret : partoprenu la **Zamenhofan-feston en Kelmis** kaj manĝu pladon ŝatatan de Maigret... (p. 5).

MAIGRET [Megre] EN LA LERNEJO

Oni cxiam revenis tie. Kaj cxiujoje Maigret havis la saman impreson ke li preterpasis la veron, ke li iam estis tuj malkasxonta gxin.

Léonie Birard ne interesis lin. Kiom gravis al li scii cxu oni volis sxin mortigi, aù nur timigi, aù cxu bazarde kuglo trafis sxian maldekstran okulon ?

Pasiigis lin la kazo de Gastin kaj konsekvence la atesto de la filo Sellier.

Li sin direktis al la korto meze de kiu li trovigxis kiam la infanoj eliris el la klasocxambro, malpli haste ol por la paùzo, kaj sin grupete direktis al la elirejo. Oni ekkonis gefratojn. Jam grandaj knabinoj permane tenis pli malgrandan kaj iuj estis vojirontaj pli ol du kilometroj por rehejmeniri.

Nur unu knabo salutis lin, krom Marcel Sellier kiu afable demetis sian kaskedon. La aliaj pasis, scieme rigardante lin. La instruisto estis cxe la sojlo. Maigret alproksimigxis al li kaj la junulo lasis lin pasi, balbutante :

- *Cu vi deziras paroli al mi ?*
- *Neaparte. Cxu vi antaùe jam venis en Saint-André ?*
- *Ne. Estas la unua fojo. Mi instruis en La Rochelle kaj en Fourras.*
- *Cxu vi konis Joseph-on Gastin-on ?*
- *Ne.*

La pupitroj kaj la benkoj estis nigraj, kovritaj de entrancxoj, la viola de inko makulante la vernison per orbrunaj rebriloj. Maigret iris gxis la unua maldekstra fenestro, ekvidis parton de la korto, la gxardenojn, la kabanon por iloj. De la dekstra fenestro li poste povis vidi la malantaùajxon de la domo Birard.

- *Cxu vi rimarkis ion, hodiaù, en la sinteno de la infanoj ?*
- *Ili estas pli enfermigxemaj ol en urbo. Eble pro timemo.*
- *Cxu ili ne interkonsiligxis, nek intersxangxis biletojn dum la instruado ?*

La anstataùanto jam ne estis dudek-du jara. Maigret videble lin

timigetis, ne nur cxar li estas policano, sed precipe cxar li estas famulo. Li sendube same kondutis antaù famkonata politikisto aù filmostelulo.

- *Mi konfesas ke mi ne atentis pri tio. Cxu mi estus devinta ?*
- *Kion vi opinias pri la juna Sellier ?*
- *Momenton... Pri kiu el ili temas ?... Mi jam ne kutimigxis al la nomoj...*
- *Knabo pli granda kaj pli dika ol la aliaj, kiu estas tre bona lernanto...*

La rigardo de la instruisto direktigxis al la unua sidloko de la unua benko, kiu kompreneble estis tiu de Marcel, kaj Maigret iris sidigxi tien, ne povante sxovi la krurojn sub la pupitron tro malaltan. De tiu loko, li ekvidis, tra la dua fenestro, ne la legomgxardenon, sed la kortan tilion kaj la domon de la familio Gastin.

- *Cxu li ne sxajnis al vi malkvieta, emociita ?*
- *Ne. Mi memoras ke mi pridemandis lin pri aritmetiko kaj notis ke li estas tre inteligenta.*

Dekstre de la instruista domo, oni ekvidis, pli foren, la fenestrojn de la unua etagxo de du aliaj domoj.

- *Mi eble petos de vi, morgaù, la permeson enveni por vidi ilin momenton dum la instruhoroj.*
- *Mi estas je via dispono. Mi kredas ke ni enlogxigxis en la saman gastejon. Estos pli agrable al mi cxi-tie pretigi miajn lecionojn.*

Maigret forlasis lin kaj estis tuj sin direktonta al la instruista domo. Ne S-inon Gastin-on li emis renkonti, sed Jean-Paul-on. Li laùiris pli ol duonon de la vojo, rimarkis ke kurteno movas, haltis, senkuragxigita pro la ideo denove trovigxi en sufokiga cxambreto, antaù la dramaj vizagxoj de la patrino kaj de la knabo.

Li malbravis. Kreskis en lin maldiligento kiu sendube venis al li el la vilagxa vivoritmo, el la blanka vino, el la suno kiu ekmalaperis malantaù la tegmentoj.

Sume kion li faris tie ? Centfoje, meze de enketo, trafis lin la sama sento pri senpovo, aù prefere pri bagatelo. Li subite trovigxis enmergita en la vivo de homoj kiujn li, la antaùan tagon, ne konis kaj lia metio estas rnalkovri ties plej intimajn sekretojn. Fakte ecx ne estas lia metio. Ja li elektis veni, cxar iu instruisto atendis lin dum horoj en la purgatorio de la justica polico.

La aero igxis blueca, pli fresxa, pli malseka. Fenestroj tie kaj tie lumigxis, kaj la forgxejo de Marchandon rugxe reliefigxis, tie oni vidis flamojn dancantajn dum cxiu balgoblovo.

En la vidalvida butikoj, du virinoj tiel senmovis kiel sur reklama kalendaro, nur iliaj lipoj malforte movigxantaj. Ili balancetis la kapon kun malgxojega mieno. Cxu ili parolis pri Léonie Birard ? Probable. Kaj ankaù pri la morgaùa entombigo, kiu estos memorinda okazintajxo en la historio de Saint-André.

La viroj daùre kartoludis. Horojn ili tiel foruzis, cxiuun posttagmezon, intersxangxante la samajn frazojn, de temp'al tempo etendante la manon al sia glaso kaj visxante la lipojn.

Li estis tuj enironta, siavice petonta duonlitron, eksidonta en angulon atendente la tagmangxan horon kiam aùto, haltante tuj apud li, abrupte movigis lin.

- *Cxu mi timigis vin ? gxoje vocxis la kuracisto. Cxu vi jam ne malkovris la sekreton de la afero ?*

Li elautigxis, ekbruligis cigaredon.

- *Tio ne similas al la grandaj bulvaroj, li rimarkigis montrante la vilagxon cxirkaù ili, la vitrinojn malbone prilumigitajn, la forgxejon, la pregxejan pardon duone malfermitan tra kiu eliris ian lumeton. Dumvintre vi devus vidi tion. Cxu vi ekalkutimigxis al la regiona vivo ?*

El « *Maigret en la lernejo* »
Georges SIMENON, 1954
Tradukis J-M. Jacques

MAIGRET À L'ÉCOLE

On en revenait toujours là. Et, chaque fois, Maigret avait la même impression qu'il était passé à côté de la vérité, qu'il avait été sur le point, à certain moment, de la découvrir.

Léonie Birard ne l'intéressait pas. Que lui importait de savoir si on avait voulu la tuer, ou seulement l'effrayer, ou si c'était par hasard qu'une balle l'avait atteinte à l'œil gauche ?

C'était le cas de Gastin qui le passionnait et, par conséquent, le témoignage du fils Sellier.

Il se dirigea vers la cour au milieu de laquelle il se trouva quand les enfants sortirent de la classe, moins précipitamment que pour la récréation, et se dirigèrent par petits groupes vers la sortie. On reconnaissait des frères et des sœurs. Des filles déjà grandes tenaient un plus petit par la main et certains allaient avoir à parcourir plus de deux kilomètres pour rentrer chez eux.

Il n'y eut qu'un gamin pour le saluer, en dehors de Marcel Sellier qui retira poliment sa casquette. Les autres passèrent en le regardant curieusement. L'instituteur était sur le seuil. Maigret s'en approcha et le jeune homme lui livra passage en balbutiant :

- Vous désirez me parler ?
- Pas spécialement. Vous étiez déjà venu à Saint-André auparavant ?
- Non. C'est la première fois. J'ai fait classe à La Rochelle et à Fourras.
- Vous connaissiez Joseph Gastin ?
- Non.

Les pupitres et les bancs étaient noirs, couverts d'entailles, avec le violet de l'encre qui faisait sur le vernis des taches à reflets mordorés. Maigret alla à la première fenêtre de gauche, aperçut une partie de la cour, les jardins, la cabane à outils. De la fenêtre de droite, ensuite, il put voir l'arrière de la maison Birard.

- Vous n'avez rien remarqué, aujourd'hui, dans l'attente des enfants ?

- Ils sont plus renfermés qu'à la ville. C'est peut-être de la timidité.
- Ils n'ont pas tenu de conciliabules, ni échangé de billets pendant la classe ?

Le remplaçant n'avait pas 22 ans.

Maigret l'intimidait visiblement, pas tant parce qu'il appartenait à la police que parce qu'il était un homme célèbre. Il se serait sans doute comporté de la même façon devant un politicien connu ou une vedette de cinéma.

- J'avoue que je n'y ai pas fait attention. J'aurais dû ?

- Que pensez-vous du jeune Sellier ?

- Un instant... lequel est-ce ?... Je ne suis pas encore familiarisé avec les noms...

- Un garçon plus grand et plus gros que les autres, qui est très bon élève...

Le regard de l'instituteur se porta vers la première place du premier banc, qui était évidemment la place de Marcel, et Maigret alla s'y asseoir, sans pouvoir glisser ses jambes sous le pupitre trop bas. De cet endroit, il découvrait, par la seconde fenêtre, non pas les potagers, mais le tilleul de la cour et la maison des Gastin.

- Il ne vous a pas paru inquiet, troublé ?

- Non. Je me souviens de l'avoir questionné en arithmétique et avoir noté qu'il était très intelligent.

A droite de la maison de l'instituteur, on apercevait, plus loin, les fenêtres du premier étage de deux autres maisons.

- Je vous demanderai peut-être, demain, la permission de venir les voir un moment pendant la classe.

- Je suis à votre disposition. Je crois que nous sommes installés dans la même auberge. Je serai mieux ici pour préparer mes leçons.

Maigret le quitta et fut sur le point de se diriger vers la maison de l'instituteur. Ce n'était pas Mme Gastin qu'il avait envie de voir, mais Jean-Paul. Il fit plus de la moitié du chemin, remarqua qu'un rideau bougeait, s'arrêta, découragé à l'idée de se trouver à nouveau dans une petite pièce étouffante, devant les visages dramatiques de la mère et du gamin.

Il fut lâche. Une paresse l'envahissait, qui lui venait sans doute du rythme de la vie au village, du vin blanc, du soleil qui commençait à disparaître derrière les toits.

En somme, qu'est-ce qu'il faisait là ? Cent fois, au milieu d'une enquête, il lui était arrivé d'avoir la même sensation d'impuissance, ou plutôt de futilité. Il se trouvait soudain plongé dans la vie de gens qu'il ne connaissait pas la veille et son métier était de découvrir leurs secrets les plus intimes. En l'occurrence, ce n'était même pas son métier. C'était lui qui avait choisi de venir, parce qu'un instituteur l'avait attendu pendant des heures dans le purgatoire de la P.J.

L'air devenait bleuâtre, plus frais, plus humide. Des fenêtres s'éclairaient par-ci, par-là et la forge de Marchandon se détachait en rouge, on y voyait danser les flammes à chaque coup de soufflet.

Dans la boutique d'en face, deux femmes étaient aussi immobiles que sur un calendrier réclame, avec seulement leurs lèvres qui remuaient légèrement. Elles avaient l'air de prendre la parole tour à tour et, après chaque phrase, la marchande hochait la tête d'un air désolé. Parlaient-elles de Léonie Birard ? C'était probable. Et aussi de l'enterrement du lendemain, qui allait être un événement mémorable dans l'histoire de Saint-André.

Les hommes jouaient aux cartes. Ils devaient user ainsi des heures, tous les après-midi, à échanger les mêmes phrases, à tendre de temps en temps la main vers leur verre et à s'essuyer les lèvres.

Il allait entrer, demander une chopine à son tour, s'asseoir dans un coin en attendant l'heure du dîner quand une auto le fit sursauter en s'arrêtant tout près de lui.

- Je vous ai fait peur ? lança la voix joyeuse du docteur. Vous n'avez pas encore découvert le pot aux roses ?

Il descendit de voiture, alluma une cigarette.

- Cela ne ressemble pas aux Grands Boulevards, remarqua-t-il en désignant le village autour d'eux, les vitrines mal éclairées, la forge, la porte de l'église qui était entrouverte et d'où sortait une vague lueur. Vous devriez voir ça en plein hiver. Vous avez commencé à vous familiariser avec la vie du pays ?

Georges Simenon,
Maigret à l'École

Giganta Kluedo



Kiel en la societa ludo, oni uzas ludkartojn. Tiuj-ĉi povas esti fabrikitaj por adaptiĝi al la temo. Tiel oni volis fari por la Trilanda renkontiĝo pri Simenon.

La 6 personoj : 6 membroj de **Senlime** (el Lieĝo, Verviers,...), kiuj pretigis por vi la promenadon tra la Lieĝaj stratoj, serĉe al la spuroj de Simenon.

La lokoj : naŭ vidindaj lokoj el la vivo de Simenon.

6 armiloj por la krimo : ponardo, kandelingo, revolvero, ŝnuro, klabo, ŝraŭbŝlosilo.

Disvolviĝo de la ludo : oni elektas, hazarde kaj sen ke iu ajn vidu ĝin, unu karton en ĉiu el la tri kategorioj. Tiuj 3 kartoj estas metitaj en koverton. La restantaj kartoj estas kune miksitaj kaj distribuitaj inter la animantoj.

Oni poste klarigas al la partoprenantoj ke Christian Libens, la fama franclingva verkisto (esperantista), kiu pretis gvidi nin dum la Trilanda renkontiĝo, mistere estis murdita dum preparkunveno...

Nur la ses animantoj partoprenis tiun preparkunvenon kaj certe nur unu el ili kulpas pri la murdo. Kiu ? La ludantoj devas malkovri tiun-ĉi, kie kaj per kiu armilo okazis la murdo...

Ili devos kune (ekz. sesope) fari la promenadon pri « Simenon », renkontante unu animanton post la alia, aŭskultante klarigon pri la vizitata loko, kaj (nur fine) esprimante suspekton : ekzemple, ĉu Jean-Marie Jacques murdis la verkiston per la ŝnuro antaŭ la naskiĝdomo de Simenon ?

Se la animanto posedas unu el tiuj 3 kartoj (J-M. Jacques, la ŝnuro aŭ la naskiĝdomo de Simenon), li/ŝi montras ĝin al la ludanto (li/ŝi montras nur unu eĉ se li/ŝi havas plurajn).

Devas pasi almenaŭ 5 minutoj antaŭ ol eventuale reveni ĉe la sama animanto, por ke la partoprenantoj vizitu la tutan promenadon.

La animantoj ankaŭ promenas kaj povas eĉ kaŝiĝi por iomete spritigi la ludon :-). Agante per eliminado, la partoprenantoj devas malkovri la 3 kaŝitajn kartojn.

Post difinita tempo (unu horo kaj duono) : kolektiĝo. Ĉiu sesopo eldiras sian konkludon, poste oni kontrolas per la kaŝitaj kartoj. Oni antaŭvidis premiojn por la gajnantoj :-)

<http://gcbbw.org/Jeux/jcluedo.htm>

Adaptis J-M. Jacques por **Senlime** (*Verviersa Esperanto-Grupo*)

La ludo « Cluedo » estas tre fama ĉe junaj homoj (7 ĝis 77 jaraĝaj !).

Jen proksimume kio povus esti la temo de la esperantigita Kluedo-ludo :

Fine de labortago en la Centra Oficejo de UEA, la Prezidanto, Trevor STEELE estas trovita murdita. La kadavro estas trenita pieden de la ŝtuparo kondukanta al la kelo.

La celo de la ludo estas solvi, per deduktoj, la enigmon metitan pro tiu krimo. Le gajnanto estas tiu kiu, la unua, montras la murdinton, trovas la uzitan armilon kaj indikas la krimejon.

Tiuj precizigoj devas inter respondi kun la 3 ludkartoj « ENIGMOJ » sekrete metitaj en kartujo komence de la ludo...

Registritaj marko kaj modelo

Ĉiuj rajtoj rezervitaj

**John Waddington Ltd 1974
Kopirajto ©**

ESPERANTO

Euxregiona kalendaro 2003 (4)



Celante plifortigi la interpopolan interkompreniĝon, helpe de la internacia lingvo esperanto, precipe en la Euxregiono Moza-Rejno, **Senlime** publikigas, por siaj kotizintaj membroj, agendon pri la esperanto-arangxo en la Euxregiono.

Gxi eventuale povas enhavi la programojn de la lokaj grupoj aux aktivajxojn organizitajn aux subtenitajn de komitatanoj. Gxi neniel igxu komplete kalendaro de esperanto-arangxo (aliaj ekzistas).

La Kelmis-aj kunvenoj de la grupoj de **Senlime** principe okazas cxiun trian vendredon de monato (krom vintre kaj ferie) en kultur-centro "Select", Lütticherstr. 264.

Gxi aperas papere kaj rete (ankaux en formato legebla de iMode-aparatoj).



Bonvenon al cxiuj... sed, pro eblaj program-sxangxo, nepre kontaktu la lokan organizanton aux grupon antaux ol partopreni aktivajxon.

01-03 Malfermo de ttt-ejo pri Senlime por i-mode aparatoj (<http://Senlime.ifrance.com>).

02-13 BE-Liège, datreveno de naskigxo de Georges Simenon, malfermo de la jaro « Simenon » (memorcele).

03-21 19h30 BE-Kelmis, Select: komuna kunveno de la lokaj grupoj (prelego de M. Schrymecker pri la pontego en Moresneto -ellaboro de nia agadplano 2003 - diversajxo).
Inf. M. Schrymecker.

04-19 promenado 14h30 - rendevuo cxe la auxtovoja eliro de Battice (parkejo)

- promenado (pieda kaj/aux bicikla) lauxlonge de la iama fervoja linio 38 (Chenee - Herve - Battice - Aubel - Plombimonto)

16h00 - pauxzo en iu trinkejo

- dauxrigo de la promenado (reiro)

18h00 Bufeda restoracio en "La Mezzanino" (Ayeneux)

Kosto : 24 EUR (kun trinkajxo kaj kafo)

N-B: bonega kuirado (malvarma bufedo, varma bufedo, desertoj,...).
Inf. R. Demarche.

05-10 09h30 BE-Kelmis, Select: komuna Trilanda Renkontigxo / Revelo-tago en Herzogenrath (Aachen)

Provizora programo:

- diservo
- prelego
- komuna tagmangxo
- vizito de monahxejo Rolduc (Herzogenrath)

Inf. K. Hogen.

06-09 14h00 BE-Kelmis, Select: festo de Neuxtrala Moresneto - foriro de promenado al la cxirkauajxo de la fervoja pontego (dato kaj rendevu-loko konfirmotaj).
Inf. M. Schrymecker.

Somera pauxzo

09-28 09h30 BE-Liège, Trilanda Renkontigxo pri Simenon : vizito de ekspozicio "Simenon, un siècle" kaj modernigita urba rondiro laux la « spuroj de Simenon ». Inf. D. Dupont.

10-17 19h30 BE-Kelmis, Select: komuna kunveno de la lokaj grupoj (prelego de R. Demarche pri "Jemeno" -2a parto).
Inf. R. Demarche.

11-21 19h30 BE-Kelmis, Select: komuna kunveno de la lokaj grupoj (Prelego de M. Schrymecker pri la pentristo Millet).
Inf. M. Schrymecker.

12-13 11h15 BE-Kelmis, Select: Zamenhof-festo. Ni cxuijare festas la datrevenon de naskigxo de Zamenhof, kiu farigxis tago de literaturo kaj libro en esperanto, per komuna fest-tagmangxo kaj kulturaj eroj (cxi-jare, Simenon estos honorigita, kulture kaj kuire...).



La komitato de Senlime petas cxies helpon por organizi kunvenojn kaj precipe trilandajn renkontigxojn.


**Cxu vi havas ideon pri vizitebla loko (eble aparte facila ebleco por tio ?), pri prelego, iu gaja vespero... ?
Nepre konatigu ĝin !**



MEMORU : aperis la 20an de decembro 2002 plej pozitiva kaj esperdona 3-paĝa artikolo pri « **Une langue sans peuple** » (lingvo sen popolo...) en la belga gazeto « LE VIF/L'EXPRESS ».

<p>Verviersa Angulo Verviersa Esperanto Grupa</p>	<h1 style="text-align: center;">Sur les traces de Simenon à Liège</h1>	
<p>Komitée de V.E.G.:</p> <p>Président: J. Jacob 18 Petit Jonckeu BE-4803 POLLEUR Tél. 087/22.10.79</p> <p>Trésorier: R. Demarche 22 rue Donckier BE-4800 VERVIERS Tél. 087/22.68.18</p> <p>Secrétaire: J.-M. Jacques 5 rue Joseph Wauters BE-4800 VERVIERS Tél. 0486/947.957</p> <p>V.E.G. dépend de l' Association pour l'Espéranto (A.P.E.) M. Delforge 16 rue des Glacères BE-6001 MARCINELLE</p> <hr/> <p style="text-align: center;">Cotisations</p> <p>Les espérantistes et sympathisants de l'Eurégion sont cordialement invités à soutenir notre programme d'action en versant dès aujourd'hui l'une des cotisations suivantes au compte n° 000-0245571-64 de: Esperanto grupo 22 rue Donckier BE-4800 VERVIERS</p> <p><i>La cotisation de Senlime est restée inchangée depuis sa création, il y a 10 ans.</i></p> <p style="text-align: center;">D'avance, merci à tous !</p> <p style="text-align: center;">A.P.E. 02-03 12 € U.E.A. 2003 50 € Senlime 2003 10 €</p> <p style="text-align: center;">en indiquant le nom du membre cotisant, le bénéficiaire et l'année: «cotisation de pour».</p>	<p>C'est l'écrivain Christian Libens, espérantiste (il a suivi les cours à Verviers voici une dizaine d'années), auteur de l'excellent petit guide « Sur les traces de Simenon à Liège »⁽¹⁾, qui nous documente sur le sujet : « Dans une œuvre pourtant riche de plusieurs centaines de titres, seuls huit de ses romans ont Liège pour cadre ».</p> <p>Parmi ceux-ci, deux enquêtes de Maigret, « Le Pendu de Saint-Pholien » et « La danseuse du Gai-Moulin », et quatre « romans durs », « Les trois crimes de mes amis », « Crime impuni », « Lettre à mon juge » et « Pedigree ».</p> <p>Alors que Georges Simenon est haut-commissaire aux réfugiés à Fontenay-le-Comte, en Vendée, un médecin, « sur la foi d'une radiographie suspecte », lui annonce qu'il n'a plus que deux ans à vivre. Il décide alors de rédiger ses souvenirs d'enfance à l'intention de son fils, Marc, âgé de deux ans. C'est André Gide qui lui conseillera d'en faire un roman. Comme Simenon l'écrivait dans une préface en 1957 : « ...Pedigree est un roman... ce qui n'empêche pas de convenir que Roger Mamelin a beaucoup de traits de ressemblance avec l'enfant que j'ai été... Dans mon roman, tout est vrai sans que rien ne soit exact. »</p> <p>En lisant Pedigree, édité en 1948, les Liégeois n'auront pas besoin de plan pour s'y retrouver. Ils s'y sentiront bien chez eux quand Elise dira simplement : « Merci, sais-tu ! », ou quand elle fera la différence entre ceux « d'au-delà des ponts » et les autres. Cette vie quotidienne des Liégeois entre 1903 et 1919, leur rappellera les histoires que leurs grands-parents racontaient, le jour de Noël, en mangeant les bouquettes.</p>	<p>Précis et poétique à la fois, Pedigree atteste de la mémoire prodigieuse de son auteur.</p> <p>En revanche, les non Liégeois devront parfois hélas interrompre leur lecture pour situer les lieux sur le plan du petit guide de Christian Libens.</p> <p>A moins qu'ils aient eu la bonne idée de partir en repérage sur place en suivant l'itinéraire Simenon spécialement redessiné et complété à l'occasion du centenaire : fléchage, bornes interactives, audio-guide (Office du Tourisme : 04/221.92.58).</p> <p>C'est le 13 février 2003, jour du centième anniversaire de la naissance de Simenon, que s'est ouverte l'année Simenon avec l'exposition « Simenon... un siècle » à l'Espace Tivoli spécialement créé au centre de Liège. Elle promène le visiteur sur le sentier thématique de la carrière de l'auteur. Jamais jusqu'à présent, même lors de « Tout Simenon », sa vie et son œuvre n'avaient été présentées de manière aussi magistralement attrayante (jusqu'au 28 septembre).</p> <p>De son côté, le Fonds Simenon de l'université de Liège propose des photos prises par Simenon sur les rivières de France tandis que le musée de la Vie wallonne se fend d'une expo sur la pipe. En septembre, une comédie musicale « Simenon et Joséphine » (Baker) sera montée au Forum par l'Opéra Royal de Wallonie. Ceci sans compter d'autres événements théâtraux et littéraires pour lesquels nous vous renvoyons au copieux programme (04/237.91.56 et www.Simenon2003.be).</p> <p>(1) Office du Tourisme de Liège – 9,80€</p>

<h1>INVITO</h1>	<h2>Senlime</h2> <p>invitas vin al sia Zamenhof-festo</p>
<p>Kiel aliaj esperantistaj grupoj, ni ĉiujare festas la datrevenon de naskiĝo de Zamenhof.</p> <p>Sed multaj forgesas, ke tiu tago estis elektita kiel tago de literaturo kaj libro en esperanto.</p> <p>Ĉi-jare – ĉefe en Belgio kaj aparte en Lieĝo - Simenon estis honorigita, kulture kaj kuire...</p> <p>Kio nenormala se ankaŭ ni, esperantistoj, dediĉos tagon al Simenon kaj al la krimromano... en esperanto ?</p>	<p>Kie ? Kulturdomo – trinkejo "Select" 264 Lütticher Strasse, BE-4720 KELMIS</p> <p>Temo ? Simenon, Zamenhof kaj krimromano en esperanto</p> <p>Kiam ? Sabaton, la 13-an de decembro ek de 12h00 (malfermo de la domo nur post 11h15 precize !).</p> <p>Programo ?</p> <p style="text-align: center;">Interkonatiĝa aperitivo Tagmanĝo Kulturaj eroj.</p> <p style="text-align: center;"><i>Bonvenon al ĉiuj (antaŭa aliĝo deviga)</i></p>



Aliĝilo: Zamenhof-festo

Ĉiu partoprenonto nepre kompletigu apartan aliĝilon (aŭ fotokopion) kaj alvenigu ĝin plej malfrue la 4-an de dec. 2003 al

S-ro R. DEMARCHE
22 rue Donckier
BE - 4800 VERVIERS.

S-ro/S-ino/F-ino:

Naskiĝdato:

jaro monato tago

familia nomo (por alfabeto ordigo)

antaŭnomo aŭ persona nomo

Adreso:

strato kaj numero

landa kaj urba kodoj urbo

tel. n-ro (kun zona prefikso) faks. n-ro (kun zona prefikso)

ret-adreso

Daŭrigo dorsflanke...

MENUO

La kvar Ardenaj porkaĵoj

—

Porea supo

—

Porka lumbaĵo kuirita en Brusela biero kun ĉerizoj
aŭ

Fileo de lupfiŝo kun pureo de salikokoj,

frititaj terpomoj aŭ frititaj kaĉobuloj,

varma legomo

—

Pufiga pankuko kun piro.



- legis, komprenis kaj aprobas la aliĝkondiĉojn,
- aliĝas al la Zamenhof-festo de **Senlime** la 13-an de decembro 2003 en Kelmis,
- **mendas** varman tagmanĝon je la prezo da **20 EUR.**
- **elektas** porkan lumbaĵon – fileon de lupfiŝo (forstreku la nevalidan)
- **antaŭe pagos tiun sumon al la konto de Senlime-Verviers :**

000-0245571-64
 ESPERANTO GRUPO
 22 RUE DONCKIER
 BE - 4800 Verviers

Eksterlandaj aliĝintoj¹, kiuj ne ŝuldas monon al **Senlime**, se necese rajtas surloke pagi sed **Senlime** nepre fakturos la mendita(j)n manĝo(j)n kaze de ne-partopreno

Tiukaze la mendinto/subskribinto persone responsas pri la surloka pago (per EŬRoj) de sia mendo (nenial surloke uzu ĉekojn, ĝirilojn, iamajn aŭ ekster-eŭropajn monerojn, k.t.p. !).

Dato:

jaro monato tago

Subskribo:

¹ Nur tiu kiu ĝustatempe alvenigis la aliĝilon al S-ro Demarche estas aliĝinto !